

TEA-BULTENO

15A JARO **JANUARO - FEBRUARO 2012** **NUMEROJ 1-2**

Ĉion, kion mi scias, mi scias nur... ĉar mi amas.
(Lev Nikolàevič Tolstòj, 1828-1910)

Kara Legantaro!

Elvolviĝas la fadenbulo de la vivo, ruliĝante malrapide, malrapide, kaj, survoje, malgrandiĝante. Pri ties grando ni ne konscias: ĉu ĝi ankoraŭ egas aŭ jam videblas la plej ekstrema fino de tiu longa, longa fadeno? Ni ne povas scii tion ĉi, bonŝance, alie ni restus tie sidantaj, senmovaj, atende tiun plej ekstreman vivlimon.
Male, ni ĉiam alstrebas al io ankoraŭa, iniciatas novajn projektojn, firme certaj pri ia morgaŭo. Fojfoje tiu fadeno, neatendite, interrompiĝas pro abrupta tondilfrapo, kiu nuligas, per unu sola bato, ĉiajn esperojn, ĉiajn revojn. Sed, io finiĝas kaj, samtempe, io komenciĝas.
Nova jaro staras antaŭ ni. La malnovo cedas sian lokon al la novo, kiu tamen kuntrenas kun si ankaŭ la balastojn de l' pasinteco, sed tiuj signifu por ni ĉiuj la defion por superi la nesupereblaĵojn. Ni, kune, solidarece, humanece kaj pace disvolvu niajn fadenbulojn kaj klopodu kontribui al pli bona kaj trankvila estonteco, ne - egoisme - nur por ni mem, sed ĉefe por la estontaj generacioj.
Kaj parto de tiu nia vivo estas ankaŭ pri- kaj poresperanta (kaj eĉ per-esperanta!), tial "*rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante ni iru la vojon celitan*!" ĉar "*L'espero, l'obstino kaj la pacienco - jen estas la signoj, per kies potenco ni paŝo post paŝo, post longa laboro, atingos la celon en gloro*". Kaj eĉ se tio ne realiĝos dum la disvolviĝo de nia propra viv-bulo, ni ja same kontentos, ĉar iel, eĉ se etmaniere, ni klopodis, paŝante sur "La Vojo" de Zamenhof, por la bono de la homaro.
Bonan Novan Jaron al Vi ĉiuj!

Via redaktanto

16ª Konferenco de Esperantistoj de Alp-Adrio TRIESTE 9/12 MAGGIO 2012

"ALP-ADRIA LABORKOMUNUMO,
PLUA EŬROPA ENGAĜIĜO"

9 majo	Alveno de partoprenantoj
h. 15	**Eŭropa Konferenco:** Kiel estus Eŭropo komence de la 21ª jarcento, se Eŭropa Unio ne ekzistus?
10-11 majo	Eŭropa Konferenco: daŭrigo de laboroj
11 majo	h. 19 - komuna vespermanĝo
12 majo	Asembleo de Alp-Adriaj esperantistoj
	Vizito de urbeto Muggia per motorŝipo 'Blua Delfeno'
	Ĝisrevida tostado

Kio en Triesto en 2012?

La Eŭropan konferencon, okazontan en Triesto, organizas Eŭropa Esperanto-Unio kaj Triesta E-Asocio, kun la kunlaboro ankaŭ de *Društvo za evropsko zavest*, Maribor, Slovenio; *Društvo za europsku svijest*, Velika Gorica, Kroatio kaj Education@Internet, Partizanske, Slovakio. Ĝi estas parto de 18-monata projekto, kiu komenciĝis aŭguste 2011 kaj estas financata de la programo "Civitaneco" de Eŭropa Komisiono.
La konferenco okazos en kvar sekcioj: politika, historia, ekonomia kaj de homaj rajtoj. Inter la prelegantoj en la politika sekcio estos kelkaj eksaj ŝtatprezidantoj. En ekonomia sekcio estas plan-ata partopreno de kelkaj gravaj ekonomikistoj kiel prof. François Grin.
Dum la konferenco, organizata por ĵurnalistoj, studentoj de ĵurnalismo kaj civitanorganizoj, oni pritraktos la ĉeftemon el pluraj vidpunktoj.

Demandoj direktitaj al triestanoj, sed... ne nur!

Ĉu vi ŝatis ĉi tiun novan rubrikon, pri kono de pri-Triestaj kuriozaĵoj? Espereble jes, ĉar intenco mia estas daŭrigi la enketon pri via scio de historiaj kaj nehistoriaj realaĵoj, intaj kaj antaj, karakterizaj de nia urbo. Do, ek al respond' de aliaj tri demandoj!
Ĉar ĵus estis pasintaj la festotagoj, dum kiuj certe vi surtabligis tipe lokajn frandaĵojn, jen la unua demando:

1) El kio konsistas la legenda "kaldrona miksaĵo", elpensita de *Pepi Klajnsic*, kromnomata *S'ciavo*?

2) Kiajn rilatojn kun Triesto havis *Fiorello Henry La Guardia*, naskita en Novjorko je la 1882ª jaro, tie mortinta en 1947, urbestro de Novjorko inter 1933 - 1945?

3) Malgraŭ la evidenta romia deveno, al kiu, laŭlegende, estas dediĉita la samnoma arko en placeto *Barbacan?*

4) Tra kiu "pordo" la vento *Bora* alvenas al Triesto, disblovante - okcidenten - ĝis *Monfalcone* kaj - orienten - ĝis la duoninsulo Istrio?

Respondoj je paĝo 4ª. Bonan kleriĝon!

Laste trovitaj!

Ekde 1851, oni komencis organizi la tiel nomitajn 'Internaciajn Ekspoziciojn' en plej diversaj landoj, tio por elmontri la ekonomian, socian, kulturan kaj teknikan evoluon atingitan de la homaro. Ofte el tiuj ekspozicioj postrestis ia konstruaĵo aŭ artaĵo, kiel ekzemple la Eiffel-turo en Parizo (1889) aŭ la Atomium en Bruselo, multe pli malfrue, en 1958.




Kiam ajn okazis foiroj aŭ aliaj gravaj eventoj naciaj, por esperantistoj tiuj signifis la plej fekundajn terenojn sur kiujn disĵeti la semon Esperanto kaj, kadre ankaŭ de la internaciaj ekspozicioj, ofte oni starigis apartajn propagandajn budojn, profitante tiel por disinformadi la multnombran vizitantaron. Krome oni metis sin je dispono por tradukoj de la propagandiloj, por disvastigi tra la mondo la gravajn okazantaĵojn ne nur en iu nacia lingvo, sed ankaŭ en Esperanto. Fojfoje estis ĝuste la organizaj komitatoj de la koncernaj aranĝoj kiuj petis la esperantistaron kunhelpi en la propaganda agado. Sekve de la bonaj rezultoj donitaj de la utiligado de Esperanto dum la Internacia Ekspozicio pri Higieno (1911) en Dresdeno, esperantistoj estis petitaj doni sian helpon ankaŭ okaze de la Ekspozicio Internacia pri Maraferoj - *Genova*, marto-novembro 1914.

Jen kiel la informo aperas en la broŝuro eldonita tiutempe:

EKSPOZICIO INTERNACIA PRI MARAFERO

Mara higieno - Itala Elmontro Kolonia

"Per unuvoĉa volo de la Registaro, de la Urbkonsilantaro, de la Urbanaro, sub la bonvolaj aŭspicioj de Lia Moŝto Princo *Tomaso* de *Savoia*, Duko de *Genova*, en 1914 stariĝos en tiu ĉi urbo la Ekspozicio Internacia pri Maraferoj, Mara Higieno kaj Itala Elmontro Kolonia.



Realiĝinte en ĉi tiu plej grava centro de la itala marvivo, kie sidas kaj floras rimarkindaj industrioj kaj entreprenoj, kiuj al marvivo donas impulson kaj samtempe de ĝi subtenon ricevas, la iniciato devos atingi, kiel certe atingos, efektiviĝon sukcesplenan kaj esence praktikan.

Aranĝite laŭ kvar specialaj fakoj: Maraferoj, Mara Higieno, Itala Elmontro Kolonia, Korpa Kulturo, la Ekspozicio ne nur efikos interesplenan kaj utilan klarigon pri ĉio ĝis nun farita profite de la marista vivo, de higieno, de korpa kulturo kaj de kolonigado, sed naskos eksciton por pli multe kaj pli fervore labori.

La momento estas favora.

La komitato esperas ricevi interkonsentan helpon kaj subtenon por la sukcesplena realigo de sia iniciato, eminente humana, gloronta la frukton de tiu granda ĉiulanda kulturlaboro, kiu estas kerno de la monda evolucio kaj progresado."

Poste la komitato sin alturnas al tutmondaj industriistoj, por altiri ilian atenton "al la granda efiko de tiel potenca interkomprenilo", kiun oni metas je dispono por la publikigo de prospektoj, katalogoj, prezaroj, sume ĉiuj reklamiloj disdonigendaj al la vizitantaro.

Krom en tiuj tutmondaj eventoj, Esperanton oni multon strebis enkonduki ankaŭ en la komercan mondon, kie tamen altaj muroj staris antaŭ la vigla aktivemo de multaj entuziasmuloj. Sed persistemo kaj konstanteco ofte alportas la justan rekompencon kaj - kvankam malrapide kaj kun grandaj streĉoj - la lingvo internacia ricevis plurajn publikajn rekonojn kiel valida kontribuanto por plisimpligi la kontaktojn inter komercistoj diversnaciaj kaj komercaj ĉambroj. Oni eĉ favoris ĝian uzadon dum la Internaciaj Komercaj Konferencoj. De la 1-a ĝis la 4-a de aprilo 1923, en Venecio, okazis la Internacia Konferenco por komerca helplingvo. Ĝi estis organizita, laŭ propono de la Internacia Centra Komitato de la E-movado (sespersona en kiu ĉefrolis UEA), de la Itala-Svisa Komerca Ĉambro sub patroneco de la itala ministro pri industrio kaj komerco. Reprezentiĝis 8 ministerioj pri komerco, 21 foiroj, 61 komercaj institucioj el 27 landoj de 5 kontinentoj: esperanto estis la sola laborlingvo. La konferenca rezolucio rekomendis ĝian utiligon en komerca, foira, radio-telegrafa, turisma kampoj kaj ĉefe en komercaj lernejoj.

En ĉi suba bildo, videblas la tre signifa glumarko



reklamanta la okazaĵon, kaj sugestanta al "praktika komercisto" labori per Esperanto. Tre vervis en tiuj jaroj la laboro de esperantistoj en komerca kampo kaj fakte la rikoltado estis abunda, sed tiu favora periodo daŭris pli-malpli ĝis la 1930-aj jaroj, kiam la tuto ŝrumpis, iom post iom, pro diversaj kaŭzoj, inter kiuj ankaŭ la fakto ke ne multaj estis la kompetentaj esperantistaj fakuloj.

Interese, ĉu ne? Plie eĉ glumarkoj kaj poŝtaj kartoj povas naski la emon esplori la tre varian historion de la Esperanto-movado!

Fontoj: Jean Amouroux, Vikipedio, Enciklopedio de Esperanto

Ĉu vi deziras legi ĉiutage freŝan kronikon Esperante?

Ĉina esperantisto, de tago al tago, informas pri tutmondaj kaj ĉiniaj politikaj kaj sciencaj eventoj. Mallonge kaj koncize sur la paĝo legeblas plej diversaj interesaĵoj. Nu, ni subtenu lian grandan laboron per ofta vizito de:

http://www.ipernity.com/blog/jianping

Informis: Vizi László

La esperantisto Javier Guerrero entreprenis la enretigon de la pinto de la historiaj literaturaj revuoj en nia Mondo "**LITERATURA MONDO**". Vidu la rezulton en: http://literaturamondo.org/

Inf. Antonio del Barrio; Fontoj: Ret-Info

PLIOFTAJ PARONIMOJ

Pludaŭras la listo de paronimoj pretigita de VIGLO, kiuj certe helpos vian pli korektan kaj precizan elparolon.

Etikedo karteto kun titolo aŭ aliaj informoj
Etiketo kortega ceremoniaro; mondumaj reguloj
Etiko scienco pri moralo

Fajro brulado de materialo produktanta varmon kaj lumon
Foiro granda komerca kunveno
Foriro moviĝo for de iu loko

Fakulto spirita kapablo
Fakultato universitata fako

Fandi likvigi per varmo
Fendi disigi, dishaki
Ofendi kolerigi iun, malrespekti

Fanfari muziki per fanfaro
Fanfaroni sin glori, pavi

Farao malnova kartludo
Faraono titolo de egiptaj reĝoj

Fascini ravi, allogi
Fasĉini fortikigi per faskoj el branĉoj

Febro plialtiĝo de korpa temperaturo
Fibro filamento, maldika fadeno

Festeno luksa festa manĝo
Festo publika aŭ privata ceremonio
Festono ornama florgirlando aŭ imitanta ĝin

Fileo karnoriĉa peco de bovo ks; ornamaĵo arkitektura
Filio societo, firmao dependa de alia
Filo virseksa homido

Firma fortika
Firmo komerca entrepreno
Firmamento la ĉiela volbo

Flako akvokvanto staranta sur vojo post pluvado
Flakono boteleto por parfumoj ks

Flamo brilo de fajro
Flano rondforma bakaĵo el pasto
Flaŭno iaspeca dolĉaĵo

Floko tufeto el malpeza materio: neĝo, fulgo ks
Flokso *(bot.)* genro el polemoniacoj
Flukso fizika grando

Floso trabaro en rivero
Fluso altmaro, tajdo

Foino mustelkato *(Martes foina)*
Fojno matura falĉita herbo sekigita

Folio plantorgano; papero ktp
Foliolo *(bot.)* involukra folio

Fondo starigo, kreo
Fonduso kapitalo por aparta difinita celo
Fonto origino de forto, elfluaĵo
Fundo malsupra surfaco
Funto pasinteca mezurunuo de pezo

Forteco intenseco
Fortreso fortikaĵo

Forto potenco, kapablo
Fuorto fortikaĵo

Frajo ovaro de diversaj animaloj
Frajto sarĝaĵo de varoj en transportilo

Frambo frukto de frambujo
Frando gustumado de delikataĵo
Franĝo ornamo kiel kvasto, galono ks

Friso ornama aranĝo; germana tribo
Frizo ago de frizanto; frizaĵo
Friska malvarmeta
Freŝa antaŭ nelonge farita, kaptita aŭ okazinta
Frizita krispe, bukle kombita

Frondo branĉo kun folioj
Fronto antaŭa linio de batalkampo; antaŭa parto de objekto
Frontono kronaĵo de la fasado
Frunto vizaĝparto

Fugo *(muz.)* kontrapunkta verko
Fuĝo forkuro

Furio diino de venĝo; furioza virino
Furo ĉasputoro

Fuligulo anserforma birdo *(Aythya fuligula)*
Fuliko G. de birdoj el la ordo de gruformaj

Fuzelaĝo ĉefa korpo de aviadilo
Fuzelo lasta parto de distilado de kruda alkoholo
Fuzeo eksplodigilo de bombo ks
Fuziliero fusilisto
Fuzio *(fiz.)* kunfandiĝo je tre altaj temperaturoj; *(fin.)* kunfandiĝo de kompanioj, societoj
Fisio *(fiz.)* kernofendado, nukleofendado

Gabio terkorbo uzata de artilerio kiel ŝirmilo
Gobio eŭropa riverfiŝo; dezerto en Centra Azio

Gago skeĉo
Gaĝo garantiaĵo
Gagato speco de nigra mineralo
Gageo arbara bulboherbo

Gaino virina vesto
Gajno monakiro, venko
Gajlo kreskaĵo pro nenormala kreskado de planta histo

Galantino malvarma gelateneca manĝaĵo
Gelateno mola substanco ekstraktita el ostoj
Gelato glaciaĵo / ĝelo
Ĝelo gelateneca substanco
Ĵeleo gelatenaĵo el fruktoj

Respondoj al demandoj pri Triesto:

1) Ĝi konsistas el porkaj lumbaĵo, lango, kolbasoj kaj acidaj brasikoj. Temas pri triesta versio de la bavari-devena *Bauernschmaus:* ĝin akompanas kremeca mustardo emulsiita kun iom da biero kaj abunda, sur la fumantan viandaĵon, raspado de kreno. Eble eĉ ne triestanoj konas la historion de tiu tipa bufedejo kaj ties fondinto: jen, mallonge, pri ĝi tute sube.
2) Lia patrino estis la triesta *Irene Coen Luzzato*, hebrea kaj hungardevena.
3) Al Rikardo Leonkora kiu, post sia reveno el la Sankta Lando, kie li ĉefrolis en la Tria Krucmilito, estis malliberigita en Triesto. La vero estas, ke la Arko estas unu el la plej gravaj, lokaj, romiaj monumentoj. Ĝi estis konstruigita en epoko de Oktavio Aŭgusto (ĉ. 33 j aK) kaj probable estis unu el la pordegoj de la muraro ĉirkaŭanta la urbon. Oni povus eĉ aserti, ke - origine - temis pri enirpordo al sankta areo, dediĉita al la "Granda Patrino" (*Magna Mater*). La arko estas alta 7,20 metrojn, larĝa 5,30 kaj profunda 2 m. Parte, ĝin oni enkorpigis en la apudan domon, konstruitan en 1913.
4) *Bora* eniras Trieston tra la "pordo de *Postumia*[1]", dirita precize "pordo de *Bora*", en malaltiĝanta teritorio ĉe la Juliaj Alpoj, inter la karsta altebenaĵo de Monto *Re*, (*Nanos-Hrusica*) kaj la ĉeno de Monto *Nevoso* (Snežnik-Jvornik).

[1] Postojna, en Slovenio, je ĉirkaŭ 45 km de Triesto


Buffet "Da Pepi"

Tiu ĉi bufedejo estis unue starigita en 1897 de iu *Pepi Klajnsic* en Placo de la Borso *(Piazza della Borsa)* kaj ekde tuje ĝi estis nomita "*Pepi s'ciavo*" (Pepi, la slavo). Eta klarigo: en tiuj tempoj estis normale moknomi ĉiun kaj ĉiel, laŭ la personaj karakterizo, karaktero, aspekto, deveno aŭ simile. Tiuj kromnomoj estis tre popularaj ĉe la malpli alta popola tavolo. Tiu ĉi kutimo daŭris ĝis preskaŭ la dua mondmilito. En 1903, mastro *Pepi* translokiĝis al strato Ŝparkaso (*via Cassa del Risparmio*) en ununuran lokalon kaj poste, en 1908, li cedis tiun ĉi al *Paolo Tomazic*. Dum kelkaj jaroj, ofte ŝanĝiĝis la posedanto de tiu ejo, ĝis fine, en 1918, la bufedejo ree iĝis posedaĵo de tiu *Tomazic*, kiu kune kaj kunlabore kun la kuzo *Pepi* kaj la bofrato de la unua estro, *Giusto Colja*, daŭrigis la aktivadon. Pasis la jaroj, al la origina ejo aldoniĝis kromaj du ĉambroj, plinombriĝis la laborantaro, ankaŭ per membroj de la familio *Colja*, kaj la bufedejo prosperis kaj fariĝis renoma tra la tuta urbo. En la antaŭmilitaj jaroj ĝin fidele vizitis Princo *Tripcovich*, Barono *Bonomo*, Princo *Thurm und Taxis*, krom kompreneble ordinaraj urbanoj. Dum la periodo de la dua mondmilito, trafis la familion *Tomazic* tragedio: la filo de *Pepi* estis pafmortigita, kaj la bufedejo prirabita kaj bruligita. Ĝi fine aŭtoritate estis fermita ĝis la militfino.



Kiam oni povis ĝin ree malfermi, la proprietulo jam estis mortinta, en 1944, pro bombofalo sur sian domon. La vidvino transdonis la laboran aktivecon al siaj gefratoj, kiuj pligrandigis la ejon (1952) kaj, konsekvence, pliiĝis la laboro. Seriozeco, laboremo, respekto de la gastronomiaj tradicioj el la aŭstrohungara kuirarto kaj afableco estas la ĉefaj kaŭzoj de la sukceso de tiu bufedejo, kiu daŭre titoliĝas "*Da Pepi*" *(*Ĉe Pepi) honore al la fondinto. Servado rapida kaj ĝentilmaniera, proponitaj manĝaĵoj bongustaj kaj frandindaj, spicitaj per simpatio kaj ŝercemo estas ĝiaj precipaj ecoj. Indas sperti unu el la varmaj pladoj tie manĝeblaj, akompane de elkrana freŝa biero de la firmao *Dreher*! Provu, vi ne bedaŭros!

Deziras korespondi kun VI!



Luis Angel Gonzàlez Martinez
(19-jarulo)
Calle 2-da N° 11, Santa Olaya
Santo Domingo, Villa Clara
CUBA 53000

Walter Càrdenaz Rodriguez
(19-jarulo)
Crucero "Las Casimbas"
Santo Domingo Villa Clara - CUBA 53000

Raicel Garcia Pérez (25-jarulo)
Calle 1-ra Final, Santa Olaya
Santo Domingo, Villa Clara
CUBA 53000

Rachel Cabrera Hernandez (16-jarulino)
Calle Independencia N° 165
Santo Domingo, Villa Clara
CUBA 53000

Jorge ABREU (51-jarulo—bibliotekisto)
pri ĉiuj temoj), ankaŭ rete:
mmgonzalez@ucf.edu.cu
S. Sànchez, 102 - CRUCES
57500 CFGOS—CUBA

Kolektanto de Esperantaj Filatelaĵoj

Carlos Devizia interesiĝas pri poŝtmarkoj kaj glumarkoj rilataj al Esperanto. Li kolektas ankaŭ priesperantajn poŝtkartojn aŭ kovertojn. Li pretas aĉeti aŭ interŝanĝi.

Interesatoj lin kontaktu ĉe jena retpoŝta adreso:
carlosdevizia@yahoo.com.ar

Tra la mondo...

VATIKANO - Samkiel dum la antaŭaj benoj je *Urbi et Orbi*, Kristnaske kaj Paske, ankaŭ en 2011 grupo de esperantistoj ĉeestis en placo sankta Petro por levi alte la panelojn kiuj konsistigas la vorton "Esperanto". La iniciato estis tradicie gvidata, de la itala Giovanni Conti. Antaŭ ol la Papo aperu en la centra loĝio de la Baziliko, la itala televido montris frontlinie la panelojn kaj la raportisto tiel ekdiris: "Unu el la lingvoj, kiujn la Papo uzos por diri siajn bondezirojn estos Esperanto, kiu estas la lingvo...". Sed, tuj poste, li ŝanĝis temon por anonci la aperon de la Papo. Ĉiuokaze la panelojn oni remontris dum la elsendo plurfoje, aparte dum la Esperant-lingva saluto de la Papo.

Pli da informoj ĉe la IKUE-paĝaro (www.ikue.org)

Kokidaĵo laŭ SZEKSZARD-a[1] maniero

(frandita de Eŭgeno de Zilah, en Decs[2] la 17-an de oktobro 2011 kaj preparita de Marika Kozsuch)

Jen la bezonataj ingrediencoj:

1 kokido dispecigita (laŭ artikoj, sen kapo, kolo, piedoj kaj internaĵoj)
4-5 supkuleroj da faruno
1 supokulero, ebenigita, da papriko
4 dekonlitroj da laktokremo
5 dekonlitroj da lakto
5-6 dispremitaj bulberoj da ajlo
salo (kvanto laŭ gusto)

PREPARADO

Miksu la farunon kun la papriko! Kunmiksu la kremon, lakton kaj dispremitajn ajlerojn. Salu la viandopecojn, kaj lasu ilin ripozi dum unu horo. Poste, ilin turnu en la faruno-papriko-miksaĵo!

Metu ilin unutavole en fajroimunan bakujon/platkaserolon, teflonan aŭ vitran, kaj surverŝu la lakto-ajlan kunmetaĵon!

Baku ĝin dum 50 minutoj, kovritan per aluminiofolio. Poste, forpreninte la aluminiofolion, rostu la tuton dum ĉ. 10-15 minutoj, ĝis la surfaco brunetiĝas.

Surtabligu kun terpoma kaĉo aŭ blanka rizaĵo.

Bonan apetiton!

1 prononcu: "seksarda" (sed ne kredu tion kion Vi diras!)
2 (elp. Deĉ) granda vilaĝo en Suda Hungario

LA LASTA ALJUĜO DE THORSEN-APOGO

Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen dividis sian restantan bonhavon 1.155 eŭroj inter sep ricevantoj. Per tio la 15-a aljuĝo de subvencioj el la donaco de ges-roj Thorsen fariĝis la lasta. La konata dana esperantista paro donacis la bazan bonhavon de la Biblioteka Apogo al UEA en la jaro 1997 kaj samjare okazis ankaŭ la unua disdono. Origine oni antaŭvidis, ke la donacita mono sufiĉus por deko da jaroj, sed la gajnita rento plilongigis la vivodaŭron de tiu speciala kaso de UEA. Per la decido de Claude Nourmont, estrarano pri kulturo kaj vicprezidanto de UEA, kaj Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA, subvencion en formo de Esperanto-libroj ricevis Demokratia Kongolanda Esperanto-Asocio (250 €), Asocio de Beninaj Esperantistoj (250 €), Reza Kheir-Khah (Tajvano, Ĉinio; 200 €), Marc Vanden Bempt (Belgio; 155 €), Biblioteko de la E-Muzeo en Svitavy (Ĉeĥio; 155 €), **Triesta Esperanto-Asocio** (Italio; **100 €**) kaj Kroata Esperanto-Ligo (55 €).

TEA ricevis la tri-voluman ĉinan verkon "Ĉe Akvorando", romanon skribitan antaŭ pli ol 400 jaroj kaj elstare tradukitan de Laŭlum (*Li Shijun*) kaj la gvidilon tra la kvartalo de la Centra Oficejo de UEA "Tuj apude", verkitan de Humphrey Tonkin. Danke al tiu fondaĵo, en la daŭro de 15 jaroj, nia asocio ricevis plurfoje donace diversajn librojn, kiuj ne sole pliriĉigis nian bibliotekon, sed konatigis la lokan esperantistaron kun la plej eminentaj esperantaj literaturaĵoj.

Solvo de kvizo de Viglo



Solvo de la pasinta proverb-kvizo:

"Proverbo estas sperto,
proverbo estas averto".

Inter la solvintoj, du estis ĉi foje la premiitoj: Federico Dal Col kaj Amalia Zerpini! Ili ricevis la poŝkalendaron "La Jaro" 2012, eldonitan de Flandra Esperanto-Ligo. Gratulojn al la sukcesintoj!

Januara Programo

6 vendredo	**Epifania Festotago**
9 lundo	**19h30** - Unua-grada kurso
10 mardo	**17h30** - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
13 vendredo	**20h00** - El nia Biblioteko: legaĵoj el la libroj eldonitaj de Ludovikito
16 lundo	**19h30** - Unua-grada kurso
17 mardo	**17h30** - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
20 vendredo	**20h00** - Estrarkunsido malfermita al ĉiuj
23 lundo	**19h30** - Unua-grada kurso
24 mardo	**17h30** - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
27 vendredo	**20h00** - 'Triesta dialekto' - konversacio kun Ennio Gerolini
30 lundo	**19h30** - Unua-grada kurso
31 mardo	**17h30** - Unua - kaj dua-gradaj kursoj

Februara Programo

3 vendredo	**20h00** - 'Etimologio: skizo pri la deveno de la vortoj en Esperanto' - el prelego de Floriano Pessoa
5 dimanĉo	**10h00 - Ĝenerala TEA-Asembleo**
6 lundo	**19h30** - Unua-grada kurso
7 mardo	**17h30** - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
10 vendredo	**20h00** - Secesia Arkitekturo en Prago - Fotoj de Elda kaj Pino
13 lundo	**19h30** - Unua-grada kurso
14 mardo	**17h30** - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
17 vendredo	**20h00** - El nia Biblioteko: legaĵoj el la libroj eldonitaj de Ludovikito
20 lundo	**19h30** - Unua-grada kurso
21 mardo	**17h30** - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
24 vendredo	**20h00** - 'Triesta dialekto' - konversacio kun Ennio Gerolini
27 lundo	**19h30** - Unua-grada kurso
28 mardo	**17h30** - Unua - kaj dua-gradaj kursoj

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21
Tel: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscalinet.it
Grupa ttt-ejo://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

Ordinara Jara Asembleo de Tea

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **dimanĉon la 5an de februaro 2012 je la 10:00, unua kunvoko, kaj je la 10:30, dua kunvoko**. Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro de partoprenantoj.

TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj la sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2011:
    a) Morala raporto de la prezidanto *(Edvige Ackermann)*
    b) Agadraporto de la sekretario *(Elda Doerfler)*
    c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto *(Giuseppe Valle)*
    ĉ) Raporto pri la libro-fako *(Giuseppe Valle)*
    d) Deklaracio de la revizoroj *(Amalia Zerpini - Elio Nocent)*
    e) Raporto de la triesta katedro *(Elda Doerfler)*
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

DELEGILO

La asociano _____

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon la 5an de februaro 2012.

Subskribo_____

Dato _____

Notu bone!
Okaze de la Asembleo eblos pagi al la kasisto la renovigojn de TEA-kotizo, FEI- kaj UEA-membrecoj, abonojn al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp. La sekretario peras abon-pagojn de LA GAZETO kaj membro-kotizojn de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista—Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj).